

Internacieco aŭ Universaleco
Artikolo de Pierre Janton en la *Monata Cirkulero* de KCE, aprilo 1974
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 556, 1974.06.05 & 08

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Freŝdata recenzo de ĵus aperinta lernolibro de *Esperanto por franclingvanoj* kaj la respondo de la aŭtoro al la recenzisto starigis lingvan debaton inter du egale kompetentaj esperantistoj kaj egale taŭgaj argumentoj. Al la lernolibro la nederlanda leganto riproĉis, ke ĝi entenas francismojn. La verkinto sin defendis montrante, ke lia teksto estis verkita surbaze de la verkoj *Plena Ilustrita Vortaro* kaj *Plena Gramatiko* sub la kontrolo de akademiaj instancoj.

A.- Pierre Janton, profesoro de esperanto en la Universitato de Clermont-Ferrand, Francio, profitis tiun lingvan debaton por verki interesan artikolon, kies titolo estas *Internacieco aŭ Universaleco*. Tiu teksto ĵus aperis en la informilo *Monata Cirkulero* de Kultura Centro Esperantista. Jen citaĵoj el tiu artikolo de Pierre Janton :

Cl.- « *La problemo ekstarinta el tiu ĉi diskuto kuŝas en la fakto, ke iu esperantisto perceptis kiel fremdaĵon la lingvo-uzon de alia. Kiu el la du estis plej influata de sia propra gepatra lingvo estas nesolvebla kaj cetere seninteresa demando. [...] Simila malglataĵo inter du spertuloj levas la demandon pri la naturo kaj difino de internacieco sur la lingva kampo. [...]*

A.- *Vere internacia formo devus esti facile komprenebla kaj ŝajni tute natura eĉ al komencanto ĝuste pro tio, ke ĝi estas internacia, tio estas, ke ĝi respondas al internaciaj mensaj strukturoj. Estas unu el la taskoj de lingvistiko serĉadi kaj difini tiujn mensajn lingvajn strukturojn aŭ **universalaĵojn**, kiuj estas komunaj al ĉiuj homoj. [...]*

Cl.- *Internaciaj lingvoj ekzistas ja, aŭ jam ekzistis, sed ili respektas aŭ rigardas malmulte la internaciajn mensajn strukturojn. Ili baziĝas sur pure sociaj, ne lingvaj faktoroj : ĉu la eŭropaj strukturoj kongruas kun la hindaj aŭ ŝahilaj tute ne maltranviligis la koloniistojn, kiuj trudis sian lingvon al Azio kaj Afriko.*

A.- *Rilate esperanton la sociaj faktoroj ne ludas same gravan rolon. Neniu ekonomia aŭ politika potenco altrudas ĝin al aliaj nacioj. Kompense de tiu granda malavantaĝo sur la socia kampo, ĝi povas, kiel artefarita lingvo, celi maksimuman internaciecon sur la lingva kampo. Ne estas seninterese ekzameni kiel la esperantistoj ekspluatis tiun eblon.*

Cl.- *La akcepto de la **Fundamento** montras, ke internacieco estis difinita kaj fiksita laŭ esence juraj, ne lingvaj kriterioj. La Fundamento estis agnoskita per internacia interkonsento de la naciaj reprezentitaj en Bulonjo kiel la sola kriterio de internacieco. Tio signifas, ke internacieco kuŝas ne en la fakto, ke la vortoj kaj reguloj entenataj en la Fundamento estas lingve internaciaj, sed ke komuna decido akceptis ilin kiel internaciaj. Oni ne demandis, ĉu tia aŭ alia vorto aŭ regulo estas internacia koncepto laŭ ĝia lingva strukturo, sed oni konsentis, ke ĝi de nun fariĝos tia.*

A.- *Oni do akceptis bazajn regulojn kaj formojn originintajn el naciaj formoj, [...] kies internacieco sur la lingva kampo estis diskutebla kaj pridubinda. [...] Laŭ jura vidpunkto tiaj formoj kongruas kun lingva internacieco. Estus bone, ke ni celu tiun ĉi lastan plej eble ofte, kiam ekzistas diversaj ebloj. »*

Cl.- Pierre Janton, tiurilate, donis kelkajn ekzemplojn. Ni citu tiun ĉi :

A.- « *Se ni konsideru la ekvivalentajn manierojn meti la saman demandon :*

Cl.- *Kian aĝon vi havas? Kiomjara vi estas? Kiom vi aĝas ?*

A.- *ni konjektas, ke franco preferos la unuan,*

Cl.- *Kian aĝon vi havas?*

A.- *kaj anglo aŭ germano la duan, kiel plej konforma al sia respektiva gepatra lingvouzo.*

Cl.- *Kiomjara vi estas?*

A.- *Tamen la tria ŝajnas al ni preferinda,*

Cl.- *Kiom vi aĝas ?*

A.- *ĉar ĝi maksimume profitas la specifecon de esperanto : per eta nombro da morfoj aŭ formoj (kiom, vi, aĝ, as) ĝi esprimas klare la tutan koncepton. Tial ĝi estas la plej racia, sekve la plej universala el la tri.*

Cl.- *Ni ĵus tuŝis novan vorton : **universala**. Ĝi kontrastas al la vorto **internacia** pro tio, ke ĝi liveras pure lingvan sencon, liberan je sociaj kaj juraj nuancoj. »*

A.- Ni citis partojn de artikolo de Pierre Janton pri la internacieco aŭ universaleco de Esperanto. Ĝi aperis en la aprila numero de **Monata Cirkulero** eldonata de Kultura Centro Esperantista.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!